# *Varadero: subtera kabligado por elektraj substacioj*



La kuba vicprezidanto Ramiro Valdés, vizitis en la provinco Matanzas, kie informi?is pri la evoluo de la laboroj kiuj fiksas subteran kablon je 110 kilovatoj en la banloko de Varadero, kio estas parto de investo konsiderata inter la ?efaj entreprenitaj de la ministerio de energio kaj minoj de la insulo, dum samtempe progresas la konstruado de la elektraj substacioj de la historia centro kaj Punta Hicacos.

Tiu ?i subtera elektra linio estos la plej longa de la tuta lando kiam fine de la nuna jaro estu finkonstruita, ?ar ?i longos 20 km, posedos tri substacioj kaj garantios sekuran energion kongrue al la kreskanta evoluo de tiu turisma regiono, la plej granda kiam temas pri suno kaj pla?oj en Kubo.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/92848-varadero-subtera-kabligado-por-elektraj-substacioj

**Radio Habana Cuba**